# VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinárodního jazyka.
Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, Mnichovo Hradiště 718
Cena – dobrovolný příspěvek
Povolil ONV MLADÁ BOLESLAV, odbor kultury 47/87-403/16

---

Numero 2 Aprilo 1990 Duben Číslo 2

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

Librereco estas la plej grava el ĉio. Pri ĝi sopiras ĉiu estulo. Mi alte taksas fakton, ke vi akiris ĝin sen perforto. Perforte oni povas solvi unu problemon – tamen elstaras la novaj … Paco signifas pli ol neekzisto de milito. La pacon karakterizas krea klopodo kaj harmonio. Ĉiuj religio spite siajn – ofte grandajn – diferencojn celas al tio, ke la homo estu bona. Tial grava estas la religia kredo mem, sed ĝia celo. Amo kaj komprenemo estinĝas la plej alte esprimo de senco por respondeco, kiu sola ebligos al la homaro transvivi kaj plue evoluiĝi. (La dekkvara Dalai-lamo en Prago 5.II.90 en Realisma teatro.)

PACAJ AFORISMOJ:
La paco similas al la aero: Ni ne perceptas ĝin nur tiam, kiam ni havas ĝin.
Neniu povas havi pacon pli longe ol deziras lia najbaro. Agricola.

Svoboda je nejdůležitější ze všeho. Touží po ní každý tvor. Vážím si toho, že jste ji vydobyli bez násilí. Násilím snad lze někdy vyřešit jeden problém – ale vzápětí vyvstanou nové … Mír znamená víc než neexistence války. Mír se vyznačuje tvořivým úsilím a harmonií. Všechna náboženství přes své – mnohdy značné rozdílnosti – směřují k tomu, aby člověk byl dobrý. Důležitá proto není sama náboženská víra, ale její cíl. Láska a porozumění se stávají nejvyšším výrazem smyslu pro odpovědnost, který jediný umožní lidstvu přežít a dál se rozvíjet (Čtrnáctý dalajláma v Praze 5.II.90 v Realistickém divadle.)

MÍROVÉ AFORISMY:
Mír je jako vzduch: nevnímáme ho, pokud ho máme.
Nikdo nemůže mít mír déle než chce jeho soused. Agricola.

En iujn domojn revenas anstataŭ heroo malvarma urno kun cindro. Aischylos.

Ne iru dormi, se vi timas morgaŭon! Amenhotep.

Kio estas imperioj, se ne grandaj rabaĵoj! Sankta Augustino.

Malhonoron al milita gloro, honton al armeoj, honton al milita metio, kiu ŝanĝas popolon aŭ al pasivaj oferoj, aŭ al abomenaj ekzekutistoj. Ĉu vi ne komprenas, ke oni devas fini la militojn? Se tio prokrasti ĝus tiam ĉio, kio estis farita, estus vana. Barbusse.

La paco estu sen muroj kaj la bonstato sen palacegoj. Ili traforĝu siajn glavojn al hakfosiloj kaj lancojn siajn al falĉiletoj. Nacio kontraŭ ne levu la glavojn kaj ili ne plu lernu batali. Biblio.

Kiu malparolas, ŝajnas konsenti. Bonifaco la oka.

Vi, militistoj, jam enuas nin. Vi nenion faras kaj volas, ke ni nutru vin. Pearl Buck.

Mi ekkonis, ke milito neniam finiĝos, neniam ĝis kiam ie ankoraŭ sangumos la vundo, kiun kaŭzis la milito. Böll.

Mi proklamas ne fari malbonajn farojn, ne paroli malbonajn vortojn, ne esti malbonajn pensojn. Ne mortigu, sed honoru la vivon. Budao.

La plej granda eraro estas, ne esti konscia pri propra eraro. Carlyle.

Naŭ dekonoj de saĝeco estas – esti saĝa ĝustatempe. - La nervo de milito estas mono. Dummilite malparolas leĝoj. Homoj pli pasie ŝatas liberecon; se ili ĝi perdis por certa tempo, ol se ili havas ĝin. La paco estas libereco fondita sur bazo de respekto al rajto de ĉiuj homoj. Erari estas homa, sed resti en eraroj estas freneza. Cicero.

Mi delikate fermas okulojn al mortintoj; ni same delikate malfermas okulojn al vivantoj. Cocteau.

Kaj la batalo ĉesis, ĉar ne plu estis batalantoj. - Mi premas malamikon al la koro, sed nur cele sufoki lin. Corneille.

Ratoj kaj venkintoj ne povas atendi kompaton en malamikeco. Colton.

Do leckterého domu se vrací místo hrdiny chladná urna s popelem.

Nechoď spát, jestliže se bojíš zítřku. Amenhotep.

Co jsou říše, nežli velká loupežnictví? Svatý Augustin.

Hanba vojenské slávě, hanba armádám, hanba vojenskému řemeslu, které mění lid v tupé oběti, nebo v hnusné katy. Nechápeš, že se musí skoncovat s válkou? Kdyby se to mělo na čas odložit, pak všechno, co bylo vykonáno, by nebylo k ničemu. Barbusse.

Mír buď beze zdí a blahobyt bez paláců. I zkují meče své v motyky, a oštěpy své v srpy. Nepozdvihne národ proti národu meče a nebudou se více učiti boji. Bible.

Kdo mlčí, zdá se, že souhlasí. Bonifác osmý.

Máme vás, vojáků, až po krk. Nic neděláte a chcete přitom, abychom vás živili. Pearl Buck.

Poznal jsem, že válka nikdy neskončí, nikdy, dokud někde bude krvácet rána, kterou válka zasadila. Heinrich Böll.

Hlásám aby se nekonaly zlé skutky, nemluvila zlá slova, nebylo zlých myšlenek. Neusmrcujte, nýbrž ctěte život. Buddha.

Největší chybou je neuvědomovat si vlastní chybu. Carlyle.

Devět desetin moudrosti je – být moudrý včas. Nervem války jsou peníze. Ve válce mlčí zákony. Vášnivěji lpějí lidé na svobodě, když ji načas ztratili, než když jim vůbec zůstala zachována. Mír je svoboda založená na uznání práv každého člověka. Lidské je mýliti se, ale bláznovství v omylu setrvávat. Cicero.

Mrtvým zavíráme oči zlehka; stejně zlehka jemně otvírejme oči žijícím. Cocteau.

I ustal boj, protože nebylo více bojovníků. - Tisknu nepřítele k srdci, však jen abych jej udusil. Corneille.

Krysy a dobyvatelé nesmějí očekávat soucit v neštěstí. Colton

Nova esperanta gazeto „La Ondo“ en Sovetio estas preparata. Ĝi ligiĝas al tradicio de samnoma gazeto de moskva E-grupo de Saĥarov. 6 numeroj jare, po 32 paĝoj kun fotoj kaj ilustraĵoj. Landa peranto por Ĉeĥoslovakio serĉata.

Katolikaj esperantistoj denove oficiale aktivas. Katolika sekcio estis refondita post 13jara paŭzo kaj aprobita de ĈEA. Unue ĝi fondiĝis dum la konstitua kongreso de ĈEA 1969. Samjare estis aranĝita 1-a tendaro en Herbortice, kiu ripetiĝis dum 9 jaroj. En la jaro 1977 invadis la tendaron ŝtata polico, por likvidi ĝin. De tiu tempo spite tribunalaj procesoj kaj diversaj persekutado kaj diskriminacioj, plu daŭris aktivado de anoj malgraŭ katakombaj kondiĉoj ĝis nun. Informojn kaj aliĝilojn vi povas ricevi je adreso: Miloslav Šváček, landa reprezentanto de IKUE kaj prezidanto de la katolika sekcio ĉe ĈEA, Tršická nro 6, 75127 Penčice. La unua konferenco okazos jam sabate la 19an de majo 90 je 9.30 h en kapelo de skt Katarina en Česká Třebová kun sekva riĉa programo. Tranokton mendu ĉe Cilka Kotyzová, Drobného 1112, 56002 Česká Třebová.

Nový esperantský časopis „La Ondo“ v SSSR je připravován. Navazuje na tradici časopisu moskevské E-skupiny Sacharova. 6 čísel ročně o 32 stranách s fotografiemi a ilustracemi. Je hledán zemský zprostředkovatel pro ČSSR.

Katoličtí esperantisté znovu oficiálně aktivní. Katolická sekce byla obnovena po 13leté přestávce a schválena ČESem. Poprvé byla založena při zakládajícím sjezdu ČES 1969. Ve stejném roce byl uspořádán tábor v Herborticích opakovaný po 9 let. V r.1977 přepadla tábor státní policie a likvidovala ho. Navzdory soudním procesům a různým persekucím a diskriminacím od tehdy dále trvala aktivita členů přes katakombální podmínky podnes. Informace a členské přihlášky můžete dostat na adrese: Miloslav Šváček, zemský reprezentant IKUE a předseda katolické sekce ČES, Tršická č.6, 75127 Penčice. První konference bude v sobotu 19.května 90 v 9.30 hod v kapli sv. Kateřiny v České Třebové s následujícím bohatým programem. Nocleh si objednejte u Cilky Kotyzové, Drobného 1112, 56002 Česká Třebová.

Listo da junularaj renkontiĝoj: Seznam mládežnických setkání:

- 24.-27.V.90 3a kultura festivalo en Vasteras, Svedio
- 2.-9.VI. Bostado tra Litovio
- 15.-17.VI. Vagado post tubeto el Hořice (distrikto Jičín)
- 21.-28.VI. Internacia renkontiĝo Baka-Hungario
- 22.-24.VI. Regiona renkontiĝo valbaraĵo apud Brno
- 23.-30.VI. Blankaj noktoj ĉe Blanka Maro – Arĥangelsk.
- 29.VII.-11.VIII. Somera Tendaro Lanĉov, junulara skipo
- 7.-9.IX. Regiona renktontiĝo Suda Bohemio
- 14.-16.9. „Drakiado“ Štíty, Šumperk
- 5.-7.X, Seminario por aktivistoj
- 7.-9.XII. Konferenco de junulara sekcio, Blansko

Informoj: sekci-estro Ing Vladimír Dvořák, 19400 Praha, Zelenečská 20.

Persone: Doc. RNDr Vlastimil Novobilský Csc, ĥemia fakultato en Ústí nL estis elektita dekano de la fakultato. Li akceptu sinceran gratulon de nia tuta „esperantista popolo“.

Osobní: Doc. RNDr Vlastimil Novobilský Csc, chemická fakulta v Ústí nL byl zvolen děkanem fakulty. Nechť příjme upřímné blahopřání celého našeho „esperantského lidu“.

Tradicia renkontiĝo (Brno-Bratislava-Budapeŝto) okazos 1.-3.VI.1990 en Brno, junulara hotelo „Družba“ ĉe la valbaraĵa lago. Loĝado, manĝado, ekskursoj, kulturaj vesperoj-230 Kčs. Aliĝu tuj ĉe inĝ Jana Burianová, Šmeralova 35.

„Verduloj“ en Francio uzas Esperanton, kiel la unuan fremdlingvon. Adreso por kontaktoj: S-ro Emile Mas, 38 rue Jean Moulin, F-33220 Sainte-Foy-la-Grande, Francio.

„Zelení“ ve Francii užívají esperanta jako první cizí jazyk. Adresa pro styk: S-ro Emile Mas, 38 rue Jean Moulin, F-33220 Sainte-Foy-la-Grande.

Internacia grupo de speleologoj eldonas gazeton VESPERTO (Netopýr). Adreso: Ing. Péter Vukov, 48-as Chyuság ú.46-48, H-7400 Kaposvár, Hungario.

En urbo Budaöra (apud Budapeŝto) komencis aktivadon unu klaso de eksperimenta lernejo kun sesjaraj gelernantoj la eduka plano de psikopedagogo L.Polgar. Laŭ lia koncepto ĉiu homo kapablas elstarajn rezultojn en kiu ajn fako kondiĉe, ke 1). li komencas frue lerni, 2). la agado devas esti intensiva, 3). ke la agado temu nur pri limigitaj fakoj. En Budaöra oni elektis matematikon kaj lingvojn (hungaran kaj fremdan). Tiu unua fremda lingvo estas Esperanto. Antaŭtagmeze oni instruas la lingvon sed „oni vivas en ĝi“. Ĉiuj instruistoj kaj edukistoj parolas tie esperante.

INFOSERVO kiel memstara ekonomia unuo de nia asocio ne ekfunkciis ekster la asocio, sed ĝi ekzistos kaj funkcios ene de la asocio. Ĝusta adreso: Infoservo, ĈEA, 11000 Praha 1, Jílská 10.

Afrankmaŝino en la poŝtoficejo Strážnice ekipis ĉiujn poŝtsendaĵojn en la tagoj 19.2.-16.3.90 per prokaza (příležitostný) stampo esperanta. Tiu raraĵo estas ankoraŭ havebla ĉe la klubo en Strážnice.

BIALYSTOK: La nova domo de Esperanto en la naskiĝurbo de Zamenhof ĉijare aranĝas 50 semajnkursojn de Eo kun atraktiva programo.

Mladá Boleslav: La nova rondeto ĉe la Kultura domo funkcias kaj regule kunvenas ĉiun duan mardon ek de la 17a horo. Ĝi servas kiel konsultejo dum instruo de diversnivelaj gesamidanoj. Aperis novaj talentoj. La klubon gvidas juna samideano Roman Heřman, kiu ĝus faris „tre bone“ la asocian ekzamenon por instruistoj de e-o: li akceptu nian sinceran gratulon!

Nia klubo en Mnichovo Hradiště 29501 senpage korektos viajn ekzercajn tradukojn kaj leterojn, se vi almetos la ĉeĥan originalon kaj poŝtmarkon por respondo.

Fervojista (Železniční) sekcio de ĈEA aranĝos (uspořádá) konferencon (28.-30.IX.90) en Staré Splavy kaj renoviĝos tradicion de famaj seminarioj en Doksy. Staré Splavy, Školící středisko „Mládí“, Lázeňský vrch 96. Loĝado, kompleta manĝado, kultura programo 250 Kčs. Nefaka publiko bonvenigata. Aliĝiloj: Fervojista sekcio, ĈES, 11000 Praha 1, Jílská 10.

KONCIZE: Membra bazo de nia asocio kreskis pasintjare el 2800 al 3200, rezulte de sistema serioza laboro de nia estraro. Ĉu ĉiu leganto de VF subtenis nian asocion per sia aliĝo? - KLADNO: Jubilea (80jj) konferenco kune kun konferenco de Paca sekcio (kun Komitatoelekto), Urba kultura domo 22+23.IX.90. Autobusa ekskurso al Lány, Lidice. Internacia partopreno. Informoj Slavík Jiří, klubestro, 27303 Stochov 62. - Strážnice: Kunveno de la junulara sekcio 22.-23.IX. - JESENÍK: La nova klubo kun 20 membroj estis fondita. - IKEF (Internacia fervojista Esperanto Federacio) – kongreso internacia, grava evento, generala provo por la Universala kongreso en Prago 1992, okazos en Brno 11.-19.V.91. Helpantoj bonvenigataj. - Naturamikoj daŭre estas aktivaj. Pri aranĝoj informos vin volonte Ludmila Potměšilová, Famfulíkova 1133, 18200 Praha 8. -

Universala kongreso en Prago 1992: ankoraŭ ne estis decidite (rozhodnuto), tamen la traktado proksimiĝas al fina stadio. ČEDOK proponis prezojn, kiuj ne estas por ne tro riĉa esperantisto atingeblaj. Pro tio nun estas traktate kun CKM ŝajne sukcese. Skeptikuloj avertas pro manko da parolkapablaj organizantoj, tamen oni kredas, ke troviĝos junaj helpantoj, kiuj partoprenos jam en la preparlaboroj. Nia prezidanto Václav Havel estis oficiale petata transpreni aŭspicion (záštitu) dum la Uko en Prago. Jam nun prepariĝu (připravujte se) por ligi novajn internaciajn amikecoj kaj invitu viajn amikojn por partopreno en la UK-o!

La VIa (eksterordinara) kongreso de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio okazos 16.-18.XI.90 versimile en Šumperk, kvankam la planita termino estis post 5-jara periodo en 1992. Tamen ĉi tiu jaro koincidas kun la planata Universala kongreso de UEA en Prago. Kaj la ĉefa kaŭzo por kunvoko de la eksterordinara kongreso estas nuntempaj ŝanĝoj, kiuj postulas ankaŭŝanĝojn de la statuto (starigo de ekonomiaj entreprenoj de ĈEA (espetur, Informservo k.a.). Kaj la kluboj kaj unuopuloj sendu probojn pri persono, konvena por funkcio de estraranoj. Partoprenu en la kongreso ankaŭ nefunkciuloj por koni samtempan staton de la asocio.

Skoltoj renaskiĝas en junularaj rondetoj. Enfunkciis grupoj (10-14jj) en Kladno, Písek, Kunŝtát aj. Post morto de iama gvidanto de skoltaj esperantistoj s-ano Leŝinger el Prago, provizore gvidas s-ano Pavel Sittauer, esperanto-klubo Třebíč. Adreso de la internacia Skolta-Esperanto-Ligo: p/a D.H. Withey, 21 Brookfield Avenue, Waterloo Liverpool L223YE, Britujo. Oficiala gazeto: La skolta mondo. - ESPETUR estas la nova ekonomie memstara sekcio de ĈEA pri turismo. Gvidanto ing Sobotka. Ĝi organizos nur la pli kompikajn aranĝajn ligitajn al la ŝtata permeso. Nun ĝi postulas de la ŝtato statuton de la turisma oficejo. Perspektivoj: aviadila vizito de Uko 90 en Kubo – aviadbiletoj 13500. Kun CKM kune kun loĝado kaj duonpensio 14000 Kčs. Turisma loĝado. Kun junulara sekcio: Blankaj noktoj (baras necerta kurzo de rublo). Turisma interŝanĝo kun privata loĝado. La loĝado estu taksata laŭ „osobo-den", aŭ ankaŭ unuo TPD (nomenklaturo de niaj turismaj organizaĵoj, = turistický pobytový den). Temas pri valoro de hotela loĝado + matenmanĝo (160-180 Kčs). Privata loĝado por 1 tago estas kutime nur ½ TPD, kiun oni povas interŝanĝi por samvalora servo en alia ŝtato. - PACO, gazeto de ĈEA kaj pacaj sekcioj de aliaj socialismaj ŝtatoj, ne plu aperos. La ŝtata subvenco por ĝia eldono estos alimaniere uzita. Eble ĝi aperos sub alia nomo kunlabore kun slovakia EA (Perspektivo?). - KONSULTIĜO de la sekretarioj de EA en socialismaj landoj ankaŭ ne plu okazos pro financa manko. Poloj kaj GDR proponas konsultiĝon pri „Eo kaj Eŭropa domo", tamen mankas mono. - Seminario de blinduloj okazos en Albrechtice apud Krnov. Informoj ĉe la asocio. - La monumento pri Zamenhof en Františkovy Lázně: ne sufiĉas ankoraŭ la kolektita mono. - PARDUBICE – la konferenco de la paca sekcio ne okazis pro malgranda kvanto da aliĝintoj. Lu-prezo por por la granda salono en kultura domo estis 9000 Kčs potage!

La 2a programo de ĉs televido la 4-an de aprilo elsendis ja la 19a horo duonhoran raportaĵon pri la japana religio Oomoto de la pola raportisto Roman Dobrzinski. Oni atentigis, ke ĝi uzas por la internaciaj kontaktoj Esperanton. Estis eĉ montrita specimena leciono de Esperanto por malgrandaj japanoj. - JUNA AMIKO, lerneja e-a gazeto, pf 193, H.1368 Budapeŝto, aperigis liston da lokoj kaj kluboj, kie oni instruas E-on: 52 klasoj en 17 landoj (580 lernejanoj, 420 plenkreskuloj).

Rememoraĵoj de nia veterano: František Šimánek, nask. 26.VI.1899, estas mirinde (obdivuhodně) psike vigla. Kvankam li ne plu povas (už nemůže) bone paŝi kaj partopreni en niaj klubaj kunvenoj, li almenaŭ skribe kontaktas. Ni poparte publikigos liajn rememoraĵojn. Jen la unua:
Pri la Universala kongreso 1925 en Ĝenevo. „Mi volonte priskribos (popíši) mian partoprenon en Uko en la jaro 1925 en Ĝenevo. Jam en februaro mi sendis necesan monsumon al kongresa komitato. Fine de monato julio mi forveturis de Saint-Auban, kie mi laboris, per trajno al urbo Lyon por ricevi tie en svisa konsulejo enirvizon. Ankoraŭ la saman tagon mi forveturis en Ĝenevon. Tuj post mia alveno mi anoncis min en akceptejo (recepce), kie mi ricevis kongresajn dokumentojn kaj iris serĉi mian loĝlokon. Estis tie jam multaj kongresanoj. Aspektis tio kiel en abelujo (úl) kaj esperanto sonis de ĉiuj flankoj. La kongreson partoprenis el ĉeĥoslovakio 10 virinoj, el kiuj 6 vestitaj en naciaj kostumoj (krojích), kaj 16 viroj. Laŭnome mi konis nur samideanon Rudolf Hromada el Prago kaj du fratinoj Nývltová. Mi havas komunan foton de Ĝenevaj kongresanoj. Sabate vespere renkotiĝis kongresanoj en granda halo de Viktoria palaco. Ĉe enirpordo deĵoris (měli službu) 4 policanoj-esperantistoj kun verdaj steloj sur manikoj. Prezidanto de Universala Esperanto Asocio (UEA) D-ro Edmond Privat propramane bonvensalutis ĉiun alvenanton. Post kiam la halo estis plenplena (úplně plná) kaj neniu plu venis, estis solene inaŭgurita (zahájen) la kongreso. Unue eksonis la orgentonoj de „La Espero“, himno de esperantistoj, kies tondra (hromová) melodio sonis forte kaj solene. Regis (panoval) sankteca silento kaj ĉiu ĉeestanto (přítomný) kun retenita (zadržený) spiro aŭskultis ĝis la lasta tono. Poste sekvis prelegoj, kiujn inaŭguris kiel la unua, la prezidanto de UEA mem. Li estis tre simpatia homo. Poste sekvis aliaj prelegantoj kaj post la fino ĉiuj kun neforgeseblaj impresoj disiris (rozešli se) hejmen. (Daŭrigota)

S-anino Věra Suchánková post 19-jara esploro (výzkum) en Frankfurt/M publikigis en angla, ĉeĥa, germana kaj esperanta lingvoj la verkon „La sistemo de koloraj folioj“, kiu prezentas helpon por bioenergia transformo por korpo, animo kaj spirito“ de la homo por harmonia kunvivo kun la naturo kaj kosmo. Interesuloj pri la verko skribu al la aŭtorino: Frankfurt/M, Dahlmannstr.29, 6000-BRD-SRN.

LENTAIGNE: KIEL DIRI? PRAKTIKA KONVERSACIO. (kreu /vytvořte/ frazojn, difinojn):
GAZETO: revuo, ĵurnalo, magazino – Artikolo reportera, propaganda, sensacia, seka, morda (kousavý), acerba (trpký). Fari la rubrikon teatran, filman, sportan, monduman. La angulo de ŝakamatoroj. Felietono. Teatra kritikisto. Milita korespondanto. Kunlabori kun gazeto. Redakti. Redaktoro. Lasthoraj novaĵoj. Rebaki (přepéct, předělat) la tutan artikolon. Represita artikolo. Revuo de revuoj. Ne ĉia gazeta artikolo estas fruktoporta. Influa gazeto. La gazeto deziras nur regali (pohostit) la legantoj per novaĵo. La aŭtoro de la artikolo. Bone informita gazeto. Penetri ĝis la koro de la temo. Bone vortigita ideo. Klare aludi ĵusan (dotknout se čerstvého) skandalon. Raporti pri ĝi severe (přísně) kaj malŝate. Tiu artikolo estas nur deliraĵo (blouznění). Garantii pri la ĝusteco de la informo. Trempi (namočit) sian plumon en galon, venenon. Partia ĵurnalisto. Ne povi lasi tiun provokon sen reago. Eviti personan polemikon. Elstreski ĉion, kio havas personan karakteron. Pri kelkaj detaloj mi petas, ke ili estu redaktitaj iom pli precize. La artikolo havu karakteron iom sensacian. La artikolo faris sensacion. Tiu artikolo ne spegulas (zrcadlí) la opinion de la redakcio. Akcepti ĉion, kion diras la gazetoj. Kritika spirito ne akceptas aserton sen informo pri ĝia origino kaj valoro.

Senvalorigi argumenton per lerta kritiko. Si kaŝi sub anonimeco. Persono, kiu deziras resti anonima. Skribi sub pli-malpli sincera masko. Esti apatia kontraŭ ĉiajn atakojn. Serene ignori la provokojn de gazetisto. Polemiki kun vervo. Respondrajto. Li ne ŝulda respondi. Meti finan punkton al la polemiko. Dementi. Konfirmi. La artikolo aperu en formo de respondo al … Vi devas por tio akiri la permeson de la … La informo filtriĝis en la gazetaron. Alarma novaĵo. Aŭtoritata fonto de informoj. Ĉerpi dokumentojn el la fonto mem. Diri libere sian opinion. Diskonigi sian opinion per la kanalo de la revuo. Peti, ricevi intervjuon. Gazetara konferenco. Cenzuri. Mutigi (umlčet) la gazetaron per drakonaj leĝoj (Drakono= Atena leĝodonanto). Gazetaro portas buŝumon (náhubek). Ekskluziva rajto de kopio. Ĵurnalo informa, politika, loka, semajne, maldekstra, ilustrita, faka aperas ĉiumonate. Lanĉi gazeton. Direkti, ekspluati gazeton. Labori ĉe gazeto. Paperbobenoj (cívky) por gazetpresado. Tipo (=preslitero). Tipopresa ricevilo. Aboni la gazeton. Varbi novajn abonantojn. Via abono finiĝas en majo. Subskribi abonon. Mi petas reaboni. Abonpago. Suplemento neabonebla. Rilatoj inter abonantoj kaj abonata gazeto. Gazeto vendita ĉe ĉiu stratangulo (kiosko, gazetbudo). Gazeto sendita en banderolo. Jarkolekto de gazeto. Malnova numero de gazeto. Kolekti artikolojn pri unu temo. Eltondaĵo pri iu temo. Gazeteltranĉo.

LASTMOMENTE: Renkontiĝo en Žandov apud Česká Lípa (25.-27.V.90) aŭtokampadejo SUNO, instrua kaj amuza programo. Prezoj: tranokte 25.-Kčs, ekskurso aŭtobusa 50 Kčs, duonpensio en restoracio, sume 200 Kčs. Organizantoj: E-kluboj Č.Lípa, N.Bor+Liberec. Informoj: E-klubo, ps 194, Liberec 46001

Na poslední chvilku: Setkání v Žandově u České Lípy, autokemp SLUNCE. Výukový a zábavní program. Ceny: nocleh 25.-Kčs, autobusový výlet 50 Kčs (nepovinný), polopense v restauraci, celkově 200 Kčs. Organizují E-kluby v České Lípě, N.Boru a Liberci. Informace: Esperantský klub, ps 194, 56001 Liberec

Korespondi deziras: (mallongiloj-zkratky: bk=bildkartoj; ĉl=ĉiu lando; ĉt=ĉiu temo; d=deziras; iŝ= interŝanĝas; j=jaroj; kol=kolektas; k=korespondi; m=muziko; pm=poŝtmarkoj; tm=tuta mondo)

Kutz Eŭgen, 36j, Postfach 1307, D-3590 Bad Widungen, FRGerm d k kun esperantistinoj 24-31j pri ĉt.

José Pedro Llinares, Castelbell 15-17, entrl, 2a, E-08030 Barcelona, Hisp 30j, fraŭlo, vojaĝos nunjare tra Eŭropo, serĉas E-kontaktojn.

IMUR – Internacia muzika renkontiĝo 25.-28.X.1990 Ostrava. Koncertoj de klasika, roka, folklora muziko. Instruado de popoldancoj kaj kantoj. Ekspozcio de junaj pentristoj kaj fotografistoj. Videoprojecioj. Amuzaj vespero. Prelegoj. Busekskursoj: Kastelo Hukvaldy kaj vitrofabriko en vilaĝo Karolinka. Tuja aliĝo 120 Kčs. Kontribuontoj al la programo ricevos rabaton. Internacia partopreno. Partoprenantoj estos loĝigitaj private (laŭ ebleco kunprenu dormosakon). Aliĝu ĉe ARTEMO, Masná 9, 70200 Ostrava 1. Tel: (069) 23 60 98.

Pekim Vaz, Caixa Postal, 3250, BG-69001 Manaus, Brazilo, d iŝ kasedojn kun folklora, moderna aŭ antikva muziko de ĉl

Geesp-istoj, se vi d havi internacian esperantistan familion, sendu vian foton al s-ro Li Xaio Ping, Beilou 9, Li-17, Section 2, St.Guilin, District Haping, SHEYNYANG, Ĉinio.

Kisangania Esperantista Klubo, BP 409, KISANGANI, ZAIRIO-AFRIKO deziras ricevi esperantaĵon, korespondkontaktojn.

Elina Jankova, studentino při bioteknologio, 22j, d k tm, ŝatas vojaĝi; str.Bojko Petrov, bl.84, vh.3, ap.3, BG-1517 Sofia.

Lilian Zotés Soto, R.Maria Freitag, 110210B, 21351 Rio de Janeiro, RJ, Brasilo, 22j, fraŭlino, sekretariino, ĉl, ĉt.
Natelcia Guimaraea, Caixa Postal 91091, 25600 Petropolis, RJ-Brazilo, pensiulino, ĉt ĉl
Nestor Joaquim de Oliveira, Estrada Velha de Pavuna, 2890, 20761 RIO DE Janiero, RJ-Brazilo, Fraŭlo 35j, oficisto, ĉl, ĉt.
Barbora Christina Torres Cardoso, Rua Haddock Lobo, 312 ap.702, 20260 – RIO DE JANIERO, RJ Brazilo, ĉt, ĉl, 18jj studentino
José Marques Barboza, Rua Sete deSeptembro, 329 13150 Cosmópolis, SP Brazilo, 58j, edzo, dentkuracisto, ĉl, ĉt.
Stedelijk Leergangen voor Talen, Quellenstr.31B, B-2000 Antwerpen, instruisto André Staes, 10 lernantoj ekde 24j-kontaktos kun alilandaj kursanoj, progresintoj.
Urba kulturcentro, Grela Maria+Willy, rue de la Collina 16, B-4840 Welkenraedt, instruistoj kun siaj lernantoj 11-50jaraj, ĉl ĉt, 6 lernantoj.
Forest Community School, Festherstone, David, 12L Limpafield Rd,S.Croydeon, CR2 9LP, Great Britain, 8 gelernantoj 16-74j, ĉl ĉt
Salford College of Technology, Frederick Road, Salford, M6 6PU, lektoro Gubbins Paul, 8 lernantoj 18-20jj, ĉl ĉt Great Britain
Sidcot School, instruisto David Curti, 7 st.Jude´s Tce, Weston-super-Mare BS22 8HB, Great Britain, 10 lernantoj 18jj.
Esperanto klubo F-18100 Vierzon, Chemin des Erables, 10 anoj 45-65jj, gvidanto Cahouet Raulo, ĉt, ĉl, Francio.
Popola Altlernejo, Volkschochschule „Elm Velk“, Steinstr.23, DDR. 2754 Schwerin, instruistino Gerard Ingrid, 32 lernantoj 18-65 jaraj, ĉl, ĉt
Elementa lernejo Brill, Esch/Alzette, Luksemburgo, instruisto Parini Pierre kun rondeto de 7 plenkreskuloj, ĉl ĉt.
Karlskoga Popola Altlernejo, Box 192, S-69124 Karlskoga. Svedio, diversaĝaj gestudentoj, instruisto Forsman Lars, ĉl, ĉt.
Jadwiga Rudnicka, II liceum Ogólnoksztaldce, Str Turkienicza 22, PL-35-010 Rzesow, Polska, 33 lernantoj 10-40 jaraj deziras korespondi.

xmxmxmxmxmxmx
xmxmxmxmxmx
xmxmxmx
xmxmx
xmx
x

Esperantský klub
CS-29501 Mnichovo Hradiště